

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

IPR

Organo de Internacia Ligo
de Esperantistaj Instruistoj

ILEI

Jarkolekto 12

N-ro 2, 1982

Edistudio, Pizo, Italujo

Internacia Pedagogia Revuo - n-ro 2, 1982

fotokompostado: Edistudio, C.P. 213, I-56100, Pisa, Italujo, Tf. + 39/50/48670
presado: Offset Vallerini, Pisa, Tf. + 39/50/48670

Enhavo

1-a parto

La diroj de Mateo de Célestin Freinet
Ree infanoj en Grésillon ...
Didaktikaj ludoj

Hans Fechler, Germanio

2-a parto

Problemoj ĉe la klasifiko de verboj

Félix Garcia Blázquez

3-a parto

La batalo kontraŭ analfabeteco en Etiopo
Fonoskribo
Rezolucio de la 7-a Nacia Kongreso de A.E.D.E.

de Mirko Marcetta, Italujo

Neceso de internacia kunlaboro interne de «Eŭropa-Asocio de la Instruistoj»

La diroj de Mateo.

(*Les dites Mathieu*) de Célestin Freinet

Ĉu necesas prezenti Freinet al la anoj de ILEI. Li famiĝis kiel avangarda pedagogo, enkondukante vere revoluciajn metodojn ĉirkaŭ 1925, metodojn kiuj aspektas al ni hodiaŭ tute naturaj!

Li iniciatis la «libervolan verkaĵon», «presarton en lernejo», la «libervolan desegnon», ktp. Ĉio celis al pli da libero en la lernejo.

Iom post iom adeptoj venis al li. El tiuj ĉi, multaj enkondukis Esperanton en sian klason por starigi «internacian lernejan korespondadon». En la revuo *Edukisto* Freinet ne emisiis teoriojn. Sed ĉiufoje aperis kroniko titolita *Diroj de Mateo*. Freinet ĉerpis sian inspiron en la kamparana saĝo. Kiu ne konas: *La ĉevalo kiu ne soifas?*

Freinet subtenis Esperanton kiam nia lingvo montris sin utila. Tion li pruvis plurfoje, interalie per la eldono de la broŝuro B.T. *L'Esperanto* okaze de la «centjara jaro: 1959».

Dank' al la persistemo de multaj esperantistoj en la nuna *I.C.E.M.-Esperanto* komisiono, nia lingvo pluvivas en tiu movado. Subteni la entreprenon de GEE per aĉeto de la aperinta libro estas la **devo** de ĉiu esperantisto. Mi ripetas: **estas devo**.

Lentaigne kaj ĉiuj ICEM-anoj

Letero de Frédéric Le Magadure.

Kara amiko,

Mi havas la plezuron ĉi kune sendi al vi ekzempleron de «La diroj de Mateo», kiun ni sukcesis eldoni post multaj malfacilaĵoj kaj hezitoj.

Komprenoble, ĉar ĝi estas pedagogia libro, ĝi ĉefe celas la pedagogojn. Mi opinias, ke I.P.R. estas la bona peranto por informi pri ĝi kaj por peti la sekiestrojn ke ili mendu la libron grandkvante por disvendi ĝin al siaj membroj. Tio memorigas al mi, ke mi sendis al S-ro Dazzini artikolon de Lentaigne, Freinet-ano, ĝuste pri tiu libro; por ĝin prezenti, tiu teksto ŝajnas al mi tre taŭga. Mi enmetas kopion por vi; se vi ankoraŭ ne programis ĝin por estonta numero de I.P.R., eble vi povus enmeti

ĝin nun, kun la tarifaj informoj.

Mi anticipe dankas vin kaj plej kore salutas.

Pri la kostoj de la libro.

La diroj de Mateo (Les dites Mathieu) de Célestin Freinet estas aĉetebla je 48 FF por unu ekzemplero, 80 FF por du, 30 FF po unu por tri aŭ pli da ekzempleroj, inkluzive la sendokostojn.

Konsilata vendoprezto estas: 38 FF sen afranko, 45 FF kun afranko.

Bonvolu sendi viajn mendojn, kaj viajn ĉekojn je la nomo de G.E.E., Grupo de Esperantistaj Edukistoj, F. Le Magadure, 23 rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont, Francujo. Poŝtkonĉo: G.E.E. - 1018 02W Toulouse.

La prezidanto de ILEI varme rekomendas...

Kiam mi de niaj francaj amikoj ricevis la libron en miaj manoj mi estis tre feliĉa. Komprenoble mi tuj tralegis ĝin. Mi iom konas la vojon de la verko kaj nia tre bedaŭrinde tro frue mortinta estrarano Gaston Turin ofte raportis dum niaj estrarkunsidoj pri ĝi. Kaj lia parto realigi la ideon ek de la komenco ĝis la fina rezulto estas tre granda.

En la libro de Freinet vi trovas tre valorajn ideojn por via pedagogia laboro.

Kun la Freinet movado — FINEM — ILEI kunlaboras (vidu la dorsan flankon de IPR). Multaj de niaj kolegoj en nia ligo estas membroj de FINEM.

Mi kore gratulas nian francan sektion kaj same, kiel mia amiko Frédéric Le Magadure mi urĝas, ke ĉiu sekcio grandstoke mendu la libron! Mi citas lin: «Estas devo!» La libro estu en ĉies mano!

Ree infanoj en Grésillon. Pri la 8-a Internacia Printempa Semajno.

Pli ol sesdek infanoj kaj junuletoj, el tri landoj kaj kvin grupoj, Hvidovre (Danlando), Dollbergen kaj Peine (Germanujo), Les Pradeaux kaj Hennebont (Francujo), kaj kelkaj familioj, entute cento da personoj kune vivis, lernis, promenis, ludis, kantis dum unu semajno.

Kvin internaciaj klasoj funkciis ĉiumatene: por 9-11 jaraj infanoj, sub la gvidado de Karin RUFF, Helmut SONNABEND kaj Frédéric LE MAGADURE; por 12-14 jaraj infanoj, sub la gvidado de Lis THUNE; kvara klaso, por junuloj kaj plenkreskuloj estis gvidata de Jean THIERRY.

Posttagmeze okazis:

— ekskurso al Tours kun vizito de la malnovaj kvartaloj renovigitaj, vizito de la katedraĵo, vizito de la muzeo de la metifrateco kaj ĝiaj mirindaj ĉefverkoj;

— promenadoj al la vilaĝo Saint-Martin d'Arcé, al la bazaro de Baugé, al la dolmena, vizito al farmo.

Tamen restis tempo por manlaboroj sub la gvidado de Mady TABEL, por sportoj kaj ludoj. Staĝjurnalo prepariĝis iom post iom dum la semajno, kaj en la lasta vesperkunveno, ĉiu ricevis sian ekzempleron. Ĉiutage, je la 18-a horo, ĉiuj kunvenis en la granda salono por rigardi lumbildojn pri la hejmregionoj kaj hejmurboj de la partoprenantaj grupoj. Je la 21-a horo, denove la granda salono pleniĝis por komuna kantado kaj ludado.

Entute, vigla vivo regis en amika etoso.

La geinstruistoj aldonis por si kelkajn pedagogiajn debatojn. Ili pritraktis tri ĉefajn temojn. Kaj jene konkludis:

La internacia korespondado per Esperanto donas saman ŝancon al la infanoj por havi kontaktojn kun eksterlandanoj, kaj por havi tiujn kontaktojn ili sentas la bezonon lerni. La interŝanĝoj pere de Esperanto ebligas emfazi la diversecon de la horizontoj. Necesas insisti pri la simpleco kaj korekteco de la frazoj; estas nepre neceso kontroli la leterojn por ke ĉi tiuj estu agrablaj kaj instruaj al la ricevontoj. La korespondado plene apartenas al la instruado.

Precipe rilate la lingvoinstruadon, la ĉeestantoj egale forĵetas la du ekstrecojn: la

blindan uzadon de iu lernolibro, la uzadon de metodo ekzercanta nur la parolkapablon. Aŭdi, paroli, legi kaj skribi devas esti en ĉiu leciono. Ne sufiĉas eldiri la regulojn, kiujn maturaj mensoj facile komprenas, sed oni devas kapabli uzi ilin iom post iom. Estas necese aŭdi la lingvon el diversaj fontoj, kaj ne nur el tiu de la instruisto, eĉ se li estas lerta, ĉar li ne estas «la» modelo. Tiu neceso rekondukas al la korespondado: sufiĉe ofta interŝanĝo de sonbendoj, kun ne tro longaj programoj, estas tre utila.

En Grésillon, tre aktuala estas la temo pri la rolo de internaciaj infanrenkontoj: ĉi tiuj prezentas duoblajn avantaĝojn.

Por la infanoj, ili ebligas rektajn kontaktojn kun infanoj el aliaj landoj, donas interesajn spertojn, lasas memoraĵojn sentimentalajn utilajn por la estonteco; ili ankaŭ ebligas aŭdi aliajn voĉkolorojn, alian ritmon, edukas la alktimiĝon al la diverseco kaj al la tolero.

Por la instruistoj, ili ebligas rektan konfrontadon de la spertoj, do ties pliriĉigon. Daŭraj interŝanĝoj kaj daŭraj amikaj rilatoj povas estiĝi. En tiaj renkontoj, oni praktikas Eŭropon.

La instruistoj konfrontis ankaŭ siajn financajn problemojn kaj rimedojn.

Didaktikaj ludoj

Hans Fehler, Germanio

Zip-zap.

Baza formo. La grupo sidas en rondo. Enmeze de la rondo staras unu el la ludantoj (konsilinde, ke la instruisto mem estu tiu komencanto en la meza spaco de la rondo; li povas klarigi la regulojn de la ludo kaj mem esti imitebla lernmodelo). Li/ŝi turnas sin al iu en la rondo, montrante al li/ŝi kaj dirante 'zip' (aŭ 'zap'). La signalo 'zip' signifas: Diru la nomon de via dekstra najbaro! La signalo 'zap' elvokas la nomon de la maldekstra najbaro. Post kelkaj tiaj imperativoj la mezludanto povas voki 'zip-zap'. Tio signifas ke ĉiuj en la rondo ŝanĝu siajn sidlokojn. Ĉar ankaŭ la ĝisnuna ludgvidanto serĉas sidlokon, tre verŝajne alia grupano daŭrigos la ludon, ne trovinte seĝon.

Adapto. Per tiu baza formo de la ludo 'zip-zap' oni atingos tre rapidan, ĝojigan interagadon; ĉiuj lernantoj estas ege atentemaj por trovi novan sidlokon post la niam antaŭvidebla 'zip-zap'. Sed en tiu ĉi formo ĝi ankoraŭ ne bone taŭgas por niaj pedagogiaj celoj. Por atingi celadaptajn variantojn ni povas konstrui lernsituaĵojn, kiuj progresigas samtempe la lingvan kompetentecon kaj la interagadon.

Varianto 1: Ĉe 'zip' au 'zap' ne nur diru la nomon de la najbaro (Helmut, Mario, Olle...), sed uzu frazon:

'Mia dekstra (maldekstra) najbaro estas Olle!'

'Apud mi sidas Mario!' 'Ĉe mia dekstra flanko sidas Helmut!'

ktp.

La frazformoj antaŭ donitaj de la instruisto, kolektive trovitaj de la grupo, aŭ — laŭ lernstato de la grupo — eble ankaŭ kreitaj aktuale de la unuopaj ludantoj.

Varianto 2: Ĉe 'zip' aŭ 'zap' turnu vin al via najbaro kaj diru 'Vi estas Zofia kaj vi havas (kaj mi vidas, ke vi havas...) longajn harojn, (ruĝajn ŝuojn, belan jupon, ktp.)'.

Averto pro sperto. Se vi tro akcentas la ekzercan celaspekton la dinamiko de tiuj variantoj povas malvigligi la ludon, redukti la ĝojigan energion el ĝi. Do, atentu la ekvilibron. Atentinda ankaŭ estas diferenco inter la eblaj formoj de kontakto:

— Montri al la najbarino dirante: 'Tio estas Stefania, dirante: 'Vi estas Stefania kaj vi havas...'

En tiu dua formo la ludanto konsideras, ke Stefania sidas apud li, ne kiel objekto, al kiu sufiĉas montri, sed kiel homo al kiu li povas rilati en pli direkta, eble pli intima maniero, alparolante kaj alrigardante ŝin, preta ankaŭ por akcepti respondon, minimume mimikan kaj gestan.

La diversaj lingvaj ag-variantoj malfermu kaj favoru kontakteblecojn, sed ne povas garanti kontakton bonan, kaj ne altrudu aŭ eĉ aldevenu ĝin. Sed tio dependas pli de la instruisto mem, kaj ne estas mekanisme ligita al la ludformo.

Valora objekto.

Baza formo. La grupo sidas en rondo (ne necesa kondiĉo). Ĉiu ludanto skribas 'valoran objekton' sur papereton ('ora horloĝo', 'antikva vazo', 'letero de Zamenhof', 'ŝtoneto de la luno' ktp.). La unuopajn slipojn oni kolektas en korbo (skatolo, ĉapo...). Kuraĝa ludanto elprenas slipon el la ujo kaj laŭtlege la 'valoran objekton'. Nun li prifabelas tiun objekton, aktivigante sian plenan fantazion:

- de kiu li ricevis, ŝtelis, rabis, aĉetis la objekton,
- kie situas, staras, kuŝas, troviĝas la objekto nun,
- kion li faras / faros / faris kun / per la objekto,
- al kiu li donacus / ne donacus la objekton,
- al kiu li montrus / ne montrus la objekton,
- kiom alta li taksas la valoron de la objekto,
- kial la objekto estas tiom valora al li...

Finfine la grupanoj povas ankoraŭ fari demandojn kaj tiamaniere daŭrigi la fabeladon.

Poste dua grupano elprenas alian slipon el la ujo...

Varianto 1: La tuta grupo kolektive fabelas. Ĉiu ano, kiu elkovras fantazian lingvaĵon, daŭrigas la komunan fabeladon. (Povas esti oportune, limigi la produktadon: 'Ĉiu ĉiufoje nur unu frazon!')

Varianto 2: Metu tri (aŭ du) seĝojn en la mezon de la rondo, kaj sur ĉiun seĝon unu slipon el la ujo. Ludemaj grupanoj sidiĝas sur la seĝo kaj kreive fantazias pri 'siaj' valoraj objektoj. Ili povas pridemandi unu la alian, fari dialogon — ĉiu komunika formo eblas.

Varianto 3: Formu du grupetojn. Ĉiu grupeto elpensas 'valoran objekton', skribas ĝin sur slipon kaj donas la slipon al la alia grupeto, kiu siaflanke faras la samon. Ĉiu grupeto serĉas kaj formulas nun

— aŭ kiel eble plej multajn frazojn pri la objekto,

— aŭ kiel eble plej fantaziajn, ne-realajn lingvaĵojn pri la objekto.

Post kelkaj minutoj (eble templimigo oportune) la grupetoj interŝanĝas en iu formo la rezultojn.

Varianto 4: Ĉiu grupeto ricevas slipon, sur kiu staras 3 aŭ 4 objektoj. La grupeto provas, interligi kaj kombini la objektojn per kohera (kunteniĝanta) rakonteto. (letero — horloĝo — birdo; haro — avo — arbo;...)

Varianto 5: 'Valora objekto' sur la tabulo. La grupanoj proponas vortojn, kiujn ili jam lernis. La instruisto mem kunligas la objekton kaj la proponitan vorton per frazo aŭ eĉ frazoj: *Birdo* flugas en la ĉambron kaj forprenas/rabas/ŝtelas la *oran horloĝon!*» La instruisto en tiu ĉi varianto funkcias kiel modelo. La gelernantoj laŭ kapablo povas partopreni la konstruadon de frazoj.

En ĉi tiu ludoj la fantazio estas la stimulantaj kaj movigantaj fortoj, kiu kreas la vortojn, frazojn, dialogojn, rakontetojn.

Vi certe povas ordigi la variantojn laŭ grado de lingva kapablo, kiun ili postulas de la kunludantoj. Memkompreneble la 'baza formo' ne estas la plej facila propono. Sed tion vi mem jam eltrovis.

Bela vorto.

Baza formo. Ĉiu grupano elektas laŭ plaĉo el vortprovizo sencoplenan, agrable sonantan vorton (ekz. 'printempo', 'suno', 'ferio', 'koro', 'feliĉo', 'amiko'...).

La vortprovizo:

- Per komuna 'cerb-fluiga' klopodo bele sonantaj, agrablaj vortoj (substantivoj aŭ verboj) estas kolektataj kaj skribataj sur tabulo. El tiu provizo la ludantoj poste elektas.
- Kiel materialo povas funkcii ankaŭ la substantivoj (verboj) de la lastaj (unu, du, tri...) lecionoj.
- Ĉiu ludanto elektas el sia propra vortprovizo.

Post elekto sekvas startsignalo de la instruisto. Ĉiuj rondiras, ĉiam ripetante nur tiun 'belan vorton', ĝuante ĝian belsononon. Tiamaniere la ludantoj varbas por siaj vortoj. Reciproke ili prezentas siajn vortojn kaj aŭskultas kaj gustumas la 'fremdajn' vortojn.

Ĉiu povas rezigni pri sia propra startvorto kaj alpreni la vorton de kunludanto. En tiu kazo tiuj du ludantoj formas grupeton, brak-en-brake ili rondiras, belsonigante siajn komunan vorton. La grupeto kreskas, se aliaj ludantoj alprenas la saman vorton. *Celo estu*, ke la tuta grupo kompromisu je ununura vorto kaj alvenu ĉe samtempa harmonia sonigado.

Tre verŝajne nur malofte okazas, ke la grupo finfine alvenas ĉe unu kolektiva vor-

to. Tio ne gravas! Finiĝu la ludo, se formiĝis du aŭ tri grupetoj, kiuj tre kontentaj pri siaj 'flagvortoj' rondiras kaj se vi sentas, ke neniu grupeto rezignos pri sia vorto.

Povas esti, ke du ludantoj kombinas siajn vortojn: ekz. 'printempfelicho', 'vesper-suno' ktp. Ankaŭ tiu solvo de la konflikto taŭgas por niaj didaktikaj celoj. El tiu sperto vi povas fari memstaran varianton:

Varianto 1: La ludantoj provas trovi kunulon, kun kiu ili povas fari kunmetitan vorton. Ili rondiras brak-en-brake sonigante sian solvon, aŭdigante al ĉiuj kiel bele ĝi sonas (eble ili formas melodion kaj ritmon, manklakante).

Varianto 2: La ludantoj rondiras ripetante la vortojn. La tasko estas: 'Interŝanĝu vian vorton kun grupano kaj alprenu ties vorton por belsona ripeto; post kelka tempo denove interŝanĝu...
Interesaj demandoj je la ludfino: En kies buŝo mia vorto nun estas? Kian vojon ĝi havis? Kiel ĝi sonis en la buŝo de alia ludanto? Kiuj aliaj vortoj plaĉis al mi kaj estis agrable prononceblaj?

Avertoj. La didaktika celo de tiu ludo estas, ludante alkitimigi la aŭdigan aparaton al la por gelernantoj relative nova fonetika karaktero de Esperanto. Ju pli fremda estas la sommelodio kaj prononcado por la gelernantoj, des pli granda estas la neceso, atenti tiun 'novaĵon' minimume je la komenco de la alproprigo de la lingvo. Ja ekzistas reciproka interrilato inter la kapablo diferencigi la fonemojn kaj la kapablo sonkorekte prononci. Pro tio tiaj ludaj lernsituaĵoj estas preferindaj, per kiuj intencita aŭdigado kaj aŭskultado samtempe estas stimulataj. La gelernantoj sendube sentos kaj spertos la belsonecon de Esperanto, se ili ne nur aŭskultas la modelan elparolon de la instruisto, sed mem ludante realigas la menciitan funkciajn interrilatojn, se ili do mem produktas belsonecon, kiu povas porti kaj esprimi gravajn por ili sentojn kaj ideojn.

La baza formo de la ludo havas propran dinamikon: «Ĉu mi forlasu mian vorton kaj alprenu la 'fremdan' vorton? Ne!» Tiu ĉi decidsituaĵo povas alpreni kvaliton de konflikto. Pro tio mi ofertas la ludon ankaŭ kiel lernsituaĵon por progresigi la mem-konscion pri tiu konflikto, kiu, se restante nekonscia, povas malhelpi kunlaboron. Jenaj impulsoj, donataj dum postluda komunika fazo, povas direkti la atenton kaj instigi la konscion: 'Ĉu mi facilanime rezignis pri mia vorto? Ĉu nepre bezonas harmonian akordon? Ĉu timigas min konflikto? Ĉu plaĉas al mi konflikto? ks. Ne por establi normojn, sed nur por vastigi la konscion!

Konsiderante do la internan dinamikon de la ludo, kiu per si mem tre rapide povas regi la situacion, vi lerte povas akcenti per via modela ludkonduco kaj per apartaj stimuloj la por vi valorajn celojn didaktikajn. Metu do akcenton sur la eksperimentajn eblecojn: 'Ĝuu la diversajn vortojn', kaj ne sur la potencialan konflikton: 'Pripensu zorgeme, ĉu vi vere volas forlasi vian vorton!' aŭ 'Ne tro facilanime alprenu 'fremdan' vorton!' aŭ similaĵon.

Grave estas, ke la instruisto estas ludema modelo kaj por la klare aŭdebla pro-

noncado, ritmiga, ripetado kaj por la intensa aŭskultado, preskaŭ per sia tuta korpo esprimante kaj montrante sian aŭskultintereson.

Se vi timas ĝeni per la espereble alta sonnivelo viajn najbarajn gekolegojn, modiflu la ludon al flustrado. Per tiu reduktado vi povas eĉ precizigi la prononcadon, mimikon kaj geston, do la tutecan esprimkapablon.

Kolektado.

Baza formo. La ludantoj sin kunigas en paroj. La paroj ricevas la taskon, serĉi ekster la klasĉambro ion specialan kaj alporti ĝin.

Ili revenu post difinita tempo (5 aŭ 10 minutoj). Post la reveno la lernantoj povas nomi kaj priskribi la trovitajn objektojn (Kio estas tio?...), raporti pri la ekskurso (Kie vi trovis...?) kaj kompari (Kiu objekto estas la plej ruĝa?...). La lernantoj kolektu

- ion ruĝan (helan, molan, malhelan, malmolan...);
- objektojn el kvin diversaj materialoj (leda, ŝtona, ...);
- objektojn kun kvin (kvar, tri) diversaj koloroj;
- ion aparte belan / malbelan;
- folion, kiu ankoraŭ ne estas difektita;
- kiel eble plej longan kaj kiel eble plej mallongan herberon;
- ŝtoneton, ne pli granda ol 2 cm kaj ne pli malgranda ol fingrongo;
- ktp.

Varianto 1: 'Muzeo'

La partneroj (paroj, grupetoj) alportu

- kiel eble plej multajn objektojn *unuspecajn* (paperojn aŭ lignojn aŭ ŝtonojn...) sed diversformajn, diverskolorajn...
- kiel eble plej multajn objektojn multspecajn, interesajn, impresajn, plaĉajn, malbelajn (laŭ elekto de la grupetoj/aŭ de la instruisto).

Post reveno ĉiu grupeto/paro aranĝu siajn objektojn en ekspozicia maniero, skribu la nomojn de la objekto sur slipojn, konduku la 'vizitantojn' (la instruisto funkcias kaj helpas kiel lingva eksperto).

Varianto 2: 'Astronaŭtoj'

La grupo ĵus alvenis sur fremda planedo. La astronaŭtoj en grupetoj forlasis la spacveturilon dum fiksita tempo, ĉar ekzistas ja nur limigita kvanto da oksigeno. Ili kolektu pruvojn, ke sur tiu ĉi planedo besto (aŭ homa) vivo estas ebla (aŭ ne ebla). Ili alportu la pruvojn: 'Tio estas herbero. Besto povas vivi'. 'Ni trovis akvon, do...'

Avertoj. Dum la kolektfazoj la infanoj certe ankaŭ uzos sian nacian lingvon. Ŝajnas konsilinde, ke oni ne trolimigu la lingvajn esprimeblecojn, esprimdezirojn dum la

ekskursoj; la trovado, elektado, diskutado dum la serĉanta agado estu libera kaj ludiga. Ili kolektas ja materialojn por la posta ekzerca fazo. Dum la raportoj, priskriboj, komparoj en la tutklasa kolektivo la instruisto povas gvidi kaj subteni la alproprigon de Esperanto.

La didaktika celo kaj senco de tiuj 'kolektludoj' estas, ke la lernantoj lingve pri-traktas la rezultojn de sia propra agado. Ili nomas, priskribas, komparas por la kunlernantoj la objektojn, kiujn ili serĉis, trovis, elektis, alportis, aranĝis. La motivo por estiĝi kapabla, esprimi sian agadon esperantlingve povas kreski.

Ĉirte tia metodo estas temporaba kompare kun lingvaj ekzercoj laŭlonge la metodikan fadenon de la lernolibra materialo. Pro tio la ludproponoj estu komprenata kiel aldonaj, apartaj lernsituaĵoj. Per ili la alproprigo de Esperanto sin apogas sur la agadrezultoj de la gelernantoj mem. Tio povas pozitive influi la lernpretecon, la memorkapablon — kaj la agrablecon de la tuta lernprocedo por instruisto kaj lernantoj.

N.B.: La bildetoj estas faritaj de infanoj de le Anne-Frank-lernejo en Hildesheim

Problemoj ĉe la klasifiko de verboj

Félix Garcia Blázquez, Venezuelo

En la lingvo Esperanto, unu el la aspektoj prezentantaj malfacilojn estas tiu de la reĝimo de la verbaj komplementoj, t.e. kiajn komplementojn oni devas uzi kun la diversaj verboj, kaj per kiuj rimedoj oni devas ilin marki. Ĉi tiu malfacilo originias precipe, kiel ni vidos laŭlonge de ĉi tiu artikolo, el metodologiaj difektoj ĉe la klasifiko de konceptoj koncernantaj ĉi tiun temon, troveblaj en la lernolibroj kiuj sekvas la direktivojn de la tradicia gramatiko.

Antaŭ ol plene eniri en la ekzamenon de la klasifiko de verboj konvenas indiki iujn detalojn pri la klasifiko de la komplementoj ekzistantaj en la oracio (1). Komprenoble, interesas nin prioritare, tiuj komplementoj kiuj iu- aŭ alimaniere rilatas al la verbo.

Ni memoru iujn bazajn konceptojn de la tradicia gramatiko:

*Oracio** (vidu la bibliografian noton) dividiĝas en subjekto kaj predikato. *Subjekto* estas tio pri kio oni parolas, kaj *predikato* estas tio kion oni diras pri la subjekto. La predikato povas esti *noma*, kiam ĝi konsistas el nomo (adjektivo aŭ substantivo) ligita al kopula verbo, ĝenerale «esti»: kaj *verba* konsistanta el verbo indikanta agon, en la ceteraj kazoj. La substantivo estas la kerno de la predikato. La verbaj komplementoj en la predikatoj estas la jenaj: *Rekta objekto*: estas tiu «ento» (animita aŭ ne) kiu ricevas aŭ suferas la agon esprimitan per la verbo. Ekz.:

Johano farbas la muron
La instruisto punis la lernanton.

kie «muro» kaj «lernanto» estas la objektoj, ĉar ili ricevas respektive la agojn «farbi» kaj «puni».

En la deklinaciaj lingvoj, t.e. lingvoj en kiuj la kazoj estas esprimataj per finaĵoj aŭ sufiksoj, la komplemento distingiĝas per la akuzativa finaĵo. Kontraŭe, en la lingvoj kiuj ne uzas tiun rimedon, la distingo oni faras per prepozicio (rumana, hispana) aŭ per la vortordo («angla», franca).

Nerekta objekto: estas la «ento» kiu nerekte ricevas la agon esprimatan per la ver-

bo, jen por sia favoriĝo, jen por sia damaĝo. Ekz.:

La patro donacis biciklon al sia filo

«biciklo» estas rekta objekto, kaj «filo» estas nereкта, ĉar ĉi-lasta favoriĝas pro la donaco.

En la deklinaciaj lingvoj ĝi estas indikata per la dativa finaĵo. En la nedeklinaciaj lingvoj ĝi estas reprezentata per prepozicio, ĝenerale tiuj ekvivalentaj al *por* aŭ *al*. *Cirkonstanca komplemento*: ĉi tiu komplemento indikas cirkonstancon tempan, lokan, kaŭzan, ktp laŭ kiu efektiviĝas la ago esprimita per la verbo. Ekz.:

Johano farbis la muron *dum la mateno*.
La instruisto *severe* punis la lernanton.

«dum la mateno» kaj «severe» estas la cirkonstancaj komplementoj tempa kaj maniera respektive.

Tiaj komplementoj estas konsiderataj kiel akcesoraj, t.e. ne nepre necesaj por la kompleta kompreno de la *oracio*.

En la deklinaciaj lingvoj, ili estiĝas per la finaĵoj ablativaj, instrumentalaj kaj aliaj. En la nedeklinaciaj lingvoj, per prepozicioj antaŭmetitaj al la koncernaj substantivoj, aŭ ankaŭ per adverboj.

Agentiva komplemento: estas tiu indikanta la aganton de la ago esprimita per la verbo, kiam temas pri pasiva konstruo. Ekz.:

La letero estas skribita de Petro

kie «Petro» estas la aganto ĉe la pasiva *oracio*.

En la deklinaciaj lingvoj ĝi estas esprimata per la ablativa finaĵo, kaj en la nedeklinaciaj per la prepozicioj *de*, *per* aŭ similaj.

Predikativa komplemento: estas tiu komplemento kiun postulas la kopulaj verboj, nome «esti, ŝajni, resti» ktp. Ekz.:

Mia amiko estas profesoro
Johano estis malsana

en la ekzemploj «profesoro» kaj «malsana» estas la predikativaj komplementoj aŭ ankaŭ simple predikativoj.

En la deklinaciaj oni uzas la nominativon por tiu komplemento, t.e. la sama kazo de la subjekto, kvankam ekzistas lingvoj kiuj posedas apartan kazon por tiu komplemento. En la nedeklinaciaj lingvoj ĝi estas indikata per la vortordo, nome: posta al la kopula verbo kaj sen antaŭe prepozicio.

La supre cititaj estas precipe la verbaj komplementoj ĝenerale akceptitaj en la lernolibroj pri la diversaj lingvoj. Plu poste ni parolos pri aliaj komplementoj ĉe kiuj ankoraŭ ne ekzistas akceptinda unuformeco.

Determina analizo.

La indikoj kiujn *ni* liveris pri la markiloj en la diversaj komplementoj en kelkaj okazoj povas ne esti sufiĉaj. *Ni* tuj donos la ŝlosilojn por la ekzakta determino en dubindaj situacioj, precipe ĉar multaj el tiuj komplementoj postulas prepoziciojn, en modernaj lingvoj.

Rekta - nerekta objekto Ĉi tiu konfuzo povas okazi en hispana lingvo, kie ambaŭ komplementoj povas esti karakterizataj per la prepozicio «a» (= al) kaj en Esperanto ankaŭ, ĉar ekzistas *licenco* anstataŭ prepozicio per la akuzativo. En la konvertiĝo al la pasiva voĉo, la nerekta komplemento ne povas transformiĝi en subjekto kaj ĝi devas plu teni sian *reĝimon*. Ekz.

(H) *Juan dio una limosna al leproso*. (Johano donis almozon al leprulo)

Una limosna fue dada pro Juan al leproso. (Almozo estas donita de Johano al la leprulo).

Kaj ne

El leproso fue dado una limosna pro Juan. (La leprulo estas donita almozo de Johano)

Ni vidu ekzemplon en Esperanto:

Mi petis lin ke li ne babilu.

«lin» estas nerekta komplemento malgraŭ sia finaĵo, ĉar tio petita estas «ke li ne babilu». Je la konvertiĝo oni povas fali en la jenan konstruon dubinde korektan:

Li estas petita (de mi) ke li ne babilu.

Tre karakteriza de la angla lingvo, kaj en kiu rezultas iomete mistera la funkcio de la komplemento «ke li ne babilu».

Alia analiza metodo estas la anstataŭo per fleksiita pronomo, se la komplemento troviĝas esprimita per nomo.

(H) *Juan le dio una limosna. le = al leproso* (al la leprulo)

(F) *J' écrirai une lettre à ton chef*. (Mi skribos leteron al via estro)

Je l'écrirai à ton chef. Je le lui écrirai.

l' = la = une lettre; lui = à ton chef

Se la pronomo estas akuzativa temas pri rekta komplemento. Se la pronomo estas dativa, la komplemento estas nerekta.

Nerekta - cirkonstanca komplemento. La metodo de la pasivigo ĉi-kaze ne rezultas utila, ĉar ĝi estas neŭtrala: neniu el ambaŭ komplementoj povas *estiĝi* en subjekto de pasiva voĉo. Oni devas kompreni, la analizon per la alia rimedo: la pronoma anstataŭo,

(H) *La visa vale por un mes*. (la vizo validas por unu monato)

La visa le vale. (?)

La dativa pronomo «le» ne povas aludi la tempon de valido, sed nur al persono, kaj en la ekzemplo tio ne havus sencon. Do la komplemento ne estas nereкта.

Nu bone, la fakto ke ĝi estas nek rekta nek nereкта, tio ne nepre implicas ke ĝi estus cirkonstanca. Por elimini dubojn ne restas alia vojo ol apelacii al la semantika valoro: se la komplemento indikas apartan cirkonstancon, ni jam estos solvinta la problemon.

La visa vale por un mes = La visa vale durante un mes (la vizo validas dum unu monato)

Tial, laŭ la konceptoj de la tradicia gramatiko «por un mes» estas cirkonstanca komplemento.

Rekta (objekto) - cirkonstanca komplemento. Ni memoru ke en Esperanto ekzistas la objekta kaj la direkta akuzativoj, kaj ĉi-lastan oni povas anstataŭi per adverbulo.

Ni apliku la determinajn metodojn jam konataj.

Mi iras vian domon. *konvertiĝo* Via domo estas irata de mi (nekorekta)

Do, la komplemento ne estas objekta, kaj laŭ la tradicia gramatiko ĝi estas loka (direkta) cirkonstanca komplemento.

Alia ekzemplo:

La profito valoras la penon — La peno estas valorata de la profito (nekorekta)

Pro tio, ni povas trankvile dedukti ke ni ne troviĝas antaŭ objekta komplemento. Nu, rilate al ĉu ĝi estas cirkonstanca, ĝis la momento la tradicia gramatiko ne akceptas ke la komplemento de valoro aŭ mezuro estu konsiderata cirkonstanca. Ĝia definitiva klasifiko ankoraŭ atendas vicon.

Predikativo - subjekto. Ĉar en ambaŭ kazoj oni uzas la nominativon, aŭ pli ekzakte la mankon de deklinacio, ekzistas ebleco de konfuzo kiam la lingvo akceptas la liberan ordon kiel en Esperanto. En ĉi-lasta okazo la maniero determini kiu estas la predikativo, estas simple, esplori la logikan amplekson de ĉiu komplemento. Tiu de la predikativo devas esti principe pli granda ol tiu de la subjekto. Ekz.

Besto estas leono

malgraŭ la nekutima ordo, la oracio estas gramatike korekta kaj la subjekto estas «leono» pro sia pli malgranda amplekso. Tial la predikativo estas «besto».

En ĉi-alia kazo

Laca estas mi

pli simpla estas konsideri ke la adjektivo sen akompano de substantivo, ne povas esti alio ol predikativo.

Komentoj pri la nomenklaturado.

La nomenklaturado supre eksponita troviĝas sufiĉe ĝeneraligita, tamen la franca

gramatiko havas kelkajn gravajn diferencojn.

Tie, la predikativa komplemento estas la atributo, diference de aliaj lingvoj kie la atributo estas ia substantiva komplemento.

La rekta objekto estas parte la rekta komplemento, tial ke ĝi estas konceptita morfologie pli ol semantike, ĉar oni nomas ĝin «rekta» tiel ke la komplemento troviĝas rekte ligita al la verbo, sen ia intera prepozicio⁽²⁾. Sekve la nerekta komplemento estos tiu kiu ligiĝas al la verbo per prepozicio; ne ekzistas do koincido kun la nerekta objekto (dativo) de aliaj lingvoj, kaj aldone ekzistas la risko fari konfuzon kun la cirkonstanca komplemento. La dativa komplemento en franca estas nomata «complement d' attribution» (komplemento de atribuo). Fine, la influon de ĉi-lasta filozofio oni rimarkas en la itala kaj portugala gramatikoj. Tamen en la hispana ĝi estas eksplicite rifuzita en la gramatiko de la koncerna akademio⁽³⁾.

La sistemado estas neadekvata por la studanto de fremdaj lingvoj kaj ĝenananta por la tradukisto kaŭze de sia manko de internacieco. Bedaŭrinde, Prof. Waringhien ĝin inseris en la gramatiko de Esperanto⁽⁴⁾ kune kun ĝiaj eraroj. Efektive, tio kio en franca estas rekta komplemento (sen prepozicio) en hispana povas esti rekta komplemento (kun prepozicio). Ekz.:

(F) Pierre aime Marie = (E) Petro amas Marian = (H) Pedro ama a María.

tial, temas pri konceptado kiu pli sekvas la formon ol la ideon. Alivorte, ke iu rekta objekto portu aŭ ne prepozicion dependas de ĉiu aparta lingvo, kaj tio estas tute akcidenca fakto; kontrae indiki ke la «ento» reprezentata per la objekto suferas rekte la agon kiun efektivas la subjekto-aganto — por paroli pri aktiva konstruo — estas plene universala, konsidere al la informo kiun oni deziras transdoni.

Plie, oni uzas du malsamajn kriteriojn por klasifiki komplementojn, unue semantikan, ĉe la cirkonstanca, agentiva, atribua, ktp, kaj due morfosintaksa, ĉe la rekta kaj nerekta.

La tradicia nomenklaturado, sen ia dubo, ne estas modelo de perfekteco, sed almenaŭ ĉe la klasifiko de la verbaj komplementoj, ĝi ne falis en la antaŭmenciitan eraron.

La konsekvenco de tiu metodologia eraro vidiĝas tute klare en la gramatiko de la portugala lingvo kun tragedia-komedia rezulto, ĉar oni alvenas al la kontraŭseno aserti la ekziston de «objeto direto preposicionado», t.e. rekta komplemento kun prepozicio = senprepozicia komplemento kun prepozicio!

Efektive, en gramatiko de tiu nacia lingvo oni legas:

«**Objeto direto preposicionado:** O nome *objeto direto* provém do fato de o objeto prender-se diretamente ao verbo, isto é, sen preposição. Admite-se todavia, a colocação, antes do objeto direto da preposição «a» nos seguintes casos: ...Bruto a César assassinou.»⁽⁵⁾ Rekta objekto kun prepozicio: La nomo *rekta objekto* originas de la fakto ke la objekto ligiĝas rekte al la verbo, t.e., sen prepozicio. Oni akceptas tamen, la metodon de la prepozicio «a» antaŭ la rekta objekto en jenaj situacioj: ...Bruto Cezaron murdis.)

Esperanto do, pro sia esenco, devas uzi konceptojn universalajn kiuj — kaj validu la redundeco — estu universale komprenataj. Se ne, ĝi estus submetitaj al la gramatiko de iu difinita nacia lingvo, kun la sekva damaĝo por tiu interkomprenilo asertanta esti internacia.

Kritiko al la aktualaj verboklasifikoj

Revuinte la verbajn komplementojn, ni jam povas eniri en la klasifikon de tiu vortspeco. Ni vidu do, kelkajn el la plej uzataj.

La jena estas iu klasifiko iomete senorda: senpersonaj, kopulaj, transitivaj kaj netransitivaj.

Senpersonaj estas tiuj kiuj ne havas komplementojn (ni apartigu cirkonstancajn) kaj malhavas subjekton, ekz. pluvi, tondri, ktp, kaj ĝenerale meteorologisignifaj verboj.

Kopulaj estas tiuj kiuj portas predikativon, kaj en kiu lasta, substantivo aŭ adjektivo konstituas ties kernon.

Transitivaj estas tiuj ĉe kiuj la ago pasas de la aganto al la suferanto. La subklasifiko en oblikvaj, reflektivaj kaj reciprokaj estas ja manifestiĝoj apartaj de tiaj transitivaj verboj. Oblikva estas kiam aganto kaj suferanto estas trafe diferencigitaj "entoj", reflektivaj kiam aganto kaj suferanto estas la sama ento, kaj en la reciprokaj la individuoj kiuj integras la subjekton estas samtempe agantoj kaj suferantoj.

Netransitiva estas tiu verbo kies ago manifestiĝas en la subjekto-aganto sen transmisi ĝin eksteren.

Alia maniero iom pli orda por klasifiki verbojn tuj sekvas.

Verboj komplete predikataj, t.e. tiuj kiuj ne postulas komplementojn por esti plene komprenataj (netransitivaj, senpersonaj).

Verboj nekomplete predikataj, tiuj kiuj postulas post si komplemento(j)n por esti komprenataj (kopulaj, transitivaj)

Pure semantika kriterio liveras la klasifikon: agverboj kaj statverboj.

La strukturisma kriterio uzas la koncepton pri valento, t.e. la kapablo porti determinitan nombron de komplementoj. Ni vidu la ekvivalentojn inter ĉi-lastaj kaj la tradicia sistemo.

<i>strukturisma</i>	<i>tradicia</i>
nulvalenta	senpersona
unuvalenta	netransitiva
duvalenta	kopula, transitiva
trivalenta	ekz. transitivaj kiuj postulas nerekta objekton (diri, doni)

La klasoj kiuj pli da kapdoloroj kaŭzas estas la transitiva kaj la netransitiva.

En ĉi tiu kampo la franca gramatiko havas sistemadon diferencon al la ĝis ĉi tie indikitaj, atinginte influi almenaŭ la gramatikon de la portugala lingvo.

Tie la transitivaj verboj dividiĝas jene:

Transitiva-rekta (*transitif-direct*) estas tiu kiu kunportas aŭ postulas rektan komplementon. Ĝi estas preskaŭ la sama ol la transitiva de la tradicia gramatiko kun la diferenco en la konceptado de la rekta komplemento antaŭe eksponita. Ekz.: *voir, aimer, se rappeler, manger.*

Transitiva-nerekta (*transitif-indirect*) estas tiu kiu postulas nerekta komplementon t.e. komplementon kun prepozicio. Tio inkluzivas ne nur rektan objekton (dativan) de la tradicia gramatiko, sed aliajn necirkonstancajn komplementojn kun prepozicio. Ekz.: *nuire à, se souvenir de, songer à*, ktp⁽²⁾.

La transskribita subklasifiko de la verboj ne obeas iun gravan regulon de la formala logiko, nome: «La elemento de ĉiu klasifiko devas ekskludi sin reciproke». Alivorte, ne devus ekzisti niaokaze transitivaj verboj kiuj estus samtempe rektaj kaj nerekta. Tamen, ni vidu la jenajn ekzemplojn.:

Jean peint le mur *en* vert. (Johano farbas la muron je verda)
 «le mur» = rekta komplemento; «en vert» = nerekta komplemento
 Je comparerai ton opinion *avec* celle de mon père.
 (Mi komparos vian opinion kun tiu de mia patro)
 «ton opinion» = rekta kompl. ; «celle de mon père» = nerekta kompl.
 Il a convaincu son chef *de* l' avantage de l' operation.
 (Li konvinkis sian ĉefon pri la avantaĝo de la operacio)
 «son chef» = rekta kompl. ; «l' avantage de l' operation» = nerekta kompl.

Nu, mi demonstris ke ekzistas verboj samtempe kaj en la samaj tekstoj, «transitif-directs» kaj «transitif-indirects». Do, la klasifiko ne taŭgas, des pli malbone en Esperanto kiu estas racia lingvo.

Ankaŭ Waringhien implicite adoptas la supre menciitan klasifikon, ĉar li asertas «transitiva: tia ke ĝi esprimas agon kiu pasas de la subjekto al la objekto, ekz. frapi, lavi ion, ...ridi pri io, ...utili al io, diferenci de io... Rim. 1. Kiel oni vidas el tiuj ekzemploj la objektoj de la transitivaj verboj povas esti aŭ rektaj (= senprepoziciaj) aŭ nerekta (prepozicivaj).»⁽⁶⁾.

Ni ekzameni la klasifikon en ekzemploj de la lingvo Esperanto, sed validaj ankaŭ por aliaj lingvoj.

La advokato pledas *por* justa kaŭzo.
 La perfiduloj kunlaboris *kun* la malamiko.
 Petro dependas *de* sia frato Johano.
 Ĉi tiu verko konsistas *el tri* volumoj.

Oni povus akcepti ke «justa kaŭzo» estas rekta objekto (laŭ la internacia nomenklature), ĉar tiu kiu pledas por justa kaŭzo, fakte defendas tian kaŭzon, kaj se «pledi por» sinonimas kun «defendi» la dirita konkludo estas plene pravigita.

En la dua ekzemplo, vidinte ke la malamiko favoriĝis per la helpo de la perfidulo

loj, oni povas konsideri ĝin kiel nerektan objekton (ĉiam laŭ la internacia nomenklaturato). Ĝis ĉi tie la ekzemploj pli-malpli pravigas la varingenan klasifikon.

Tamen en al tria ekzemplo, la ago ne pasas de la subjekto al la objekto, kontraŭe ĝi pasas de la objekto Johano al la subjekto Petro, ĉar en la realo, se Petro dependas de Johano, ĉi-lasto devas subteni, nutri, vesti, lin.

Finfine en la kvara ekzemplo, oni ne povas paroli pri «paso de ago», ĉar eĉ ne ekzistas ago: «konsisti» estas verbo esprimanta rilaton pure statikan inter la verko kaj la nombro de ĝiaj volumoj.

Konklude, la analizita klasifiko suferas pro kontraŭdiroj kaj malkongruoj fariĝante netaŭga ĉe la interlingvistika kampo.

Ankoraŭ ni devas citi anekdotan fakton por iom nuanci la argumentadon de la artikolo.

Iu fame konata franca vortaro⁽²⁾ citis en sia «Précis de Grammaire» (Gramatika Kompendio) kiel transitivajn verbojn «nuire, songer...» tamen en la vortaro ili estas konsiderataj kiel netransitivaj. Same PIV imitis la eraron kaj la ekzempligitaj verboj «ridi, utili, aparteni...» ĉe iliaj difinoj aperas signifitaj per «ntr» en kontraŭdiro kun la difino de transitiveco.

Konkludoj kaj rekomendoj.

Se oni apartigas la nomenklaturan aferon, en la praktiko, tio kio interesas la ĝeneralan uzanton de la lingvo estas scii kiun prepozicion oni devas uzi kun ĉiu verbo. Por tio ekzistas iuj tre malmultaj vortaroj kiuj krom klasifiki la verbon liveras informon pri kiu prepozicio devas esti uzata. Nu, bone, la Universala Vortaro de la Fundamento ne klasifikas la verbojn, nek indikas la uzendajn prepoziciojn, ĉar en la epoko de ĝia apero ne eblis postuli tiajn detalojn. Certe, la akademiaj aldonoj emas korekti tiun mankon kaj en la dubaj okazoj oni indikas al ni la karakteron de ĉiu verbo, sed nenion pli. Antaŭ tiu situacio estas tute natura ke ĉiu parolanto emas uzi en Esperanto la ekvivalentan verbon de sia denaska lingvo laŭ la preskriboj de sia nacia gramatiko aŭ vortaro. Jen la origino de la kritiko direktita al Bernard Golden⁽⁷⁾ pri la uzo de la verbo «kontribui» kun akuzativa reĝimo anstataŭ la prepozicia kiel deziris la kritikinto.

Nu bone, estas tre malfacile diri ke determinita uzmaniero estu absolute nekorekta. El la strikte gramatika vidpunkto la uzado de la klasikaj verkistoj havas malmultan aŭ nenian valoron en Esperanto sub la lumo de la enhavo de la Bulonja Deklaracio kaj la Antaŭparolo mem de la Fundamento.

Eblas ke Zamenhof estus antaŭvidinta ĉi tiujn eventualajn kriteridiferencojn, kaj por solvi ilin, supozeble, li prezentis salomonan solvon, nome, ke kiam oni ne scias kiun prepozicion uzi, oni uzu la sendifinan prepozicion *je*, kiu siavice ankaŭ povas esti anstataŭata per la akuzativo escepte kiam aperas ambigueco. Komprenble, tio ne estas definitiva solvo, sed almenaŭ liveras al ni ideon ke kiam ni kritikas kelkan uzon ŝajne nekorektan, oni devas invoki unue la mankon de klareco prefere al malakordo kun la klasika uzado.

Ĉiu ĉi detala pritraktado origininta pro la disputeto pri la reĝimo de iu verbo igis nin rimarki la anarkion ekzistantan en la klasifiko de verboj de la etnolingvoj. Komprenble ĉiu lingvo havas sian propran spiriton, sed ankaŭ veras ke ju pli unuforma kaj kohera estos la gramatika nomenklaturato, des pli facila rezultos la instruado de fremdaj lingvoj.

Ankaŭ ekzistas difektoj en la ordigo de konceptoj, pri ĉio kio rilatas al la verbaj komplementoj, krom la diferenco laŭ difinoj, oni povas mencii ke la tradicia gramatiko ne difinas la koncepton de cirkonstanca komplemento, sed nur elnombras ĝiajn klasojn. Do, ni disponas pri gravegaj motivoj por konjekti la ekziston de alispecaj verbaj komplementoj ne prezentitaj ĝis la nuna momento, aŭ almenaŭ ne sisteme instruataj en elementaj aŭ/kaj mezaj kursoj (ni aludas precipe al gimnaziaj aŭ liceaj studoj).

Pro tio, se ni kalkulas kun la internacia karaktero de Esperanto, ĝia gramatika nomenklaturato devas esti modelo de racieco, kaj samtempe de didaktiko, des pli ke oni propagandas ke la lernado de Esperanto multe faciligas la studon de fremdaj lingvoj.

Se ni adoptos do, vere racian nomenklaturon por Esperanto, ĝiaj didaktikaj ecoj akcentiĝos ankoraŭ pli kaj tio ege kontribuos al ĝia definitiva akcepto flanke de la internaciaj organizoj.

Kaj nun specife pri la klasifiko de verboj: necesas starigi difinojn tiajn kiaj ili «mutatis mutandis» rezultu validajn por ĉiuj lingvoj, sen malhelpo respekti la apartaĵojn de ĉiu el ili. Niaokaze, mi konsideras ke antaŭ ol klasifiki verbojn ni devas fari klasifikon de agoj, sendepende de la apartaj rimedoj pri kiuj disponas ĉiu lingvo por esprimi tiujn faktojn, kaj same pri la klasifiko de la lingvaj elementoj kiuj partoprenas en la koncerna esprimado.

La ekstergramatikaj konceptoj por difini estus: ago transitiva, ago netransitiva, aganto, suferanto (rekta, nereкта), cirkonstanco.

Plie oni devus realĝustigi la difinojn de la jenaj sintaksaj elementoj: subjekto, rekta kaj nereкта objektoj, predikativo, cirkonstanca komplemento, kaj iliaj respektivaj subklasoj.

Komprenble, ĉiu aparta lingvo devos difini aŭ priskribi la markilojn por ĉiu el la kategorioj supre menciitaj.

Resumo.

Oni revizias konceptojn de la Tradicia Gramatiko en la klasifiko de verboj kaj de ties komplementoj. La diskutado koncentriĝas en la agverboj kun prepoziciaj komplementoj.

Ekzistas komplementoj kun la strukturo *prep. + subst.* aplikeblaj al verboj ĝenerale konsiderataj kiel netransitivaj kiuj laŭ la tradicia nomenklaturato, nek estas rektaj objektoj, nek nerektaj, kaj ekzistas la tendenco trakti ilin kiel cirkonstancajn komplementojn.

Paralele, la verboj kiuj povas porti tiajn komplementojn malhavas nomon aŭ eltenas ian dubindan. Aliflanke, la antaŭmenciitaj komplementoj suferas modifojn ĉe sia tradukado al aliaj lingvoj, jen per ŝanĝo de iu prepozicio al alia, jen per perdo de la prepozicio, jen per aliaj rimedoj.

Ĉi-lasta situacio kaŭzas opinidiferencojn pri la klaso kaj reĝimo de tiaj verboj en Esperanto. La regulo 14-a de la Fundamenta Gramatiko principe solvas la problemon, surbaze de la uzo de la prepozicio «je». Tamen estas tre necesa profundigi la temon pro ĝia graveco por la lingvoinstruisto kaj por la tradukisto.

Esperanto, en ĝia karaktero de pontolingvo, havas la ŝancon solvi tiun problemon, kio kontribuos pliformigi ĝian prestiĝon en la interlingvistika kampo.

Bibliografiaj notoj.

- 1) García Blázquez, Félix — «Terminologiaj Demandoj en Sintakso» *Scienca Revuo*, Vol 18 n° 2 — 1967 (En ĉi tiu artikolo la aŭtoro klarigas la motivojn por preferi «oracio»n al «propozicio»)
- 2) «Nouveau Petit Larousse Illustré» — Paris 1952 — 161-a eldono; p. 1114
- 3) Real Academia Española — «Esbozo de una nueva gramática de la lengua española» Madrid 1973 p. 371.
- 4) Kalocsay & Waringhien — «Plena Analiza Gramatiko de Esperanto» Rotterdam 1980 — p. 242 k. sekvaj.
- 5) Mendes de Almeida, Napoleão — «Gramática metódica de língua portuguesa» São Paulo 1958 — p. 340
- 6) Waringhien & aliaj — «Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto» — Paris 1970 — p. 1130
- 7) Golden, Bernard — «Ekzempli — Ĉu transitiva aŭ netransitiva verbo?» *La Brita Esperantisto*, januaro-februaro 1981.

Alia Konsultita bibliografio.

Ferreira da Cunha, Celso — «Gramática da língua portuguesa» Rio de Janeiro 1980
Hornby & aliaj — «The advanced learner's dictionary of current English» London 1964.

Palazzi, Fernando — «Novissima Grammatica Italiana» — Milano 1956.

Tesnière, Lucien — «Eléments de Syntaxe Structurale» — Paris 1976.

Zamenhof, L.L. — «Fundamento de Esperanto» (kompilis A. Albaut) Marmande 1963.

La batalo kontraŭ analfabeteco en Etiopio

Etiopio kalkuliĝas inter la 31 landoj malplej evoluintaj: tamen ankaŭ estas unu el tiuj kies la procento da analfabetoj estas la plej granda: 93% de la landanaro en 1974. Tio estas des pli miriga, ke, je malproksima historia periodo, tiu antikva lando estis la dua en Afriko, post Egiptujo, disvolviginta skriban lingvon. La furoro al atingo de scio, kiun oni observas hodiaŭ, ne estas hazardokaza nek sencela en tiu lando de la fingra stampado, kie scii legi kaj skribi ĉiam investis prestiĝon, kiu malfermas multajn pordojn, en tiu lando, kie prosperis la «Skribisto», de kiu dependis la preskaŭ totalo de la landanoj pri ĉiu ajn aliro al mondo de la skribado, kaj sekve de la administracio, de la justeco, de la politika povo, de la moderna sektoro de la ekonomika vivo.

La Ortodoksa Eklezio estis prezentanta dum pluraj jarcentoj la nurajn eblecojn de instruado. Sed tiuj-ĉi estis rezervataj unuavice al la renovigo de la Eklezia servistaro. Kelkaj nombroj date de la jaroj 1960-1970 trafas montras la endemiecon de analfabeteco en Etiopio. Estas fakte en 1974, en la aĝgrupo de la 10 ĝis 45-jaraĝuloj nur 1.380.000 urbaj loĝantaj sciantaj legi kaj skribi el urba loĝantaro de 13.500.000 loĝantoj; kaj tiuj nombroj montras nur entutan situacion: ili kaŝas la amplekson de la malbona nivelo de la provincoj kaj de la regionoj: Nu, laŭ la prepara enketo de la projekto de alfabetizo kaj profesia formado de 1968, malpli de 5% el la landanaro estis konsiderata kiel sciantaj legi kaj skribi en la kampara Etiopio de 1968. Ankorau pli malfavora estis la situacio ĉe virinoj, de kiuj apenaŭ 5% sciiis legi kaj skribi en 11 de la 14 regionoj de la lando.

Por ripari tiuspecan staton, la estraro komencis en 1979, kampanjon pri kiu li opinias, ke ĝi povos konduki al la elimino de analfabeteco en 1987: Propravolaj organizoj, kiel religiaj grupoj, sindikatoj, virinaj, studentaj kaj junulaj asocioj estas alvokitaj plenumi tiurilate aktivan rolon. Tiu grandega armeo konsistanta ĉefe el lernantoj, studentoj kaj instruistoj, restis du jaroj en la kamparaj regionoj, kie ĝi sin dediĉis interalie al alfabetizaj agadoj. Proksimume 34.000 centroj estas establataj kaj 20 milionoj da libroj presitaj en 10 lingvaj (baldaŭ 15) taŭge al la plej gravaj etnaj grupoj. «Ĉiuj legsciantoj instru! Ĉiuj nesciantoj lernu!», tia estas la slogano,

kiu ĉie aperas en la ĉiutaga vivo de Etiopianoj.

Tiam, la rezultoj de tiom da klopodoj trudakiras respekton: Tri milionoj da Etiopianoj liberigitaj de analfabeteco dume de la unua kampanjo 1979/1980, malaltigas la analfabetan procenton en la lando je 35%. Dum tiu tempo, la veto definitive forigi ĝisradike analfabetecon de Etiopio por 1987 kaj de ĉiuj urbaj centroj por 1981 daŭras esti lanĉita kun, ŝajneble, seriozaj bonsukcesaj ŝancoj.

De Junio 1979 ĝis Majo 1981, proksimume 10 milionoj da personoj — tio estas unu civitano el tri — profitis de tiu kampanjo, inter kiuj 4 milionoj bonsukcesis la finan teston. Ĉiuj, kiuj vizitadis kurson, profitas krome daŭran perfektigon, ĉar 2.000 legadcentroj estas establita. La entreprenitajn agadojn kaj la atingitajn sukcesojn UNESKO volis agnoski kaj distingi atribuinte al Etiopio en 1980 la Alfabetizan Premion de la Internacia Asocio pri Legado.

Por finfini tiun gigantan entreprenon, Etiopio bezonas aktivan kaj rapidan apogon de la entuto de la Internacia Komunumo: Tiucele, la Ĝenerala Direktoro de UNESKO lanĉis je la 27-a de Junio 1981, en Addis Abeba, internacian alvokon, por ke materiala kaj financa apogo estu alportata al Etiopio por ebligi al ĝi intensigon de tiu kampanjo. Li invitis la registarojn de la membroŝtatoj, la naciajn komisionojn por UNESKO, la publikajn kaj privatajn instituciojn, la registarajn kaj neregistarajn organizojn, la virinajn organizojn kaj la junulajn movadojn kaj ankaŭ la diversajn konfesiajn ekleziojn, por ke ili alportu siajn helpojn al la Etiopia estraro.

La atendataj kontribuajoj estas ja financaj; sed ili ankaŭ povas esti laŭ formo de lernejoj provizajoj kaj ekipaĵoj: papero, kraĵonoj, ekzercaj kajeroj, nigraj tabuloj, lampoj, radio-aparatoj, kaj ankaŭ veturiloj, bicikloj, tendoj, kampadaĵ materialoj, kamparaj presmaŝinoj kaj ĉiuspecaj materialoj.

Ĉiujn komplementajn informojn pri la bezonoj kaj helpaj rimedoj oni povas ricevi skribante al: Kunordiga Komitato de la nacia alfabetiza kampanjo (Comité de Coordination de la campagne nationale d'alphabétisation), Poŝtfako 4921, Addis Abeba (Etiopio).

Fonoskribo

Mirko Marcetta, Italujo

Unu lingvo — unu fonetika skribo.

Simpla, klara, facila ankaŭ por analfabetoj — dank' al simileco inter litero, ties ĉi sono kaj formo, kun la sono de komenclitero de la nomo de objekto respektive formo de la objekto mem = A, kiel Atomo; = L, kiel Luno; = S, kiel Suno ktp...) Nova skribo, aŭ FONOSKRIBO, estas la plej taŭga ilo por klare kaj facile korespondi tutmonde.

Tiu alfabeto, kreita por la lingvo Esperanto, estas adaptebla al ĉiu ajn lingvo, nome por skribi fonetike ĉiujn lingvojn. Ĝi fariĝas vera korektilo de la fonetika konfuzo, kiu regas en multaj lingvoj.

Por fonoskribo povas esti racie esprimataj ja 784 diversaj sonoj de la homa voĉo per, kompreneble, sama nombro de diversaj signoj, kaj ĉio ĉi sur la bazo de la 28 son-elementoj adoptitaj de la lingvo Esperanto.

La nova skrib-sistemo povas esti uzata laŭ tri diversaj manieroj, aŭ gradoj. Oni komencas laŭ la tradicia maniero: metante literon ĉe litero, disigite. Poste oni kunligas la literojn posilabe kaj, fine, oni kunligas inter ili la literojn. Laŭ tiu ĉi grado oni povas skribi ĝis trifoje pli rapide ol per la ordinara skribo tradicia. Trans tiu lasta, nome trans la tria grado, la nova skribo povas fariĝi stenografio, sen bezono lerni alian alfabeton, tutsimple enkondukante en la skribsistemon logikajn mallongigojn kaj siglojn.

La alfabeto de la Fonoskribo, pro ĝia eksterordinara facila ellerneblo far de infanoj kaj analafabetoj ĝenerale, povas esti uzata ankaŭ kiel helpa alfabeto pro igi al ili pli facile ekregi la teknikon de legado kaj skribado ĝenerale. Ĝi povas esti uzata ankaŭ por fonetikigi la nefonetikajn lingvojn, tiamaniere igante ilin pli facile lerneblaj de alilingvanoj. Fine, la plej grava kaj utila uzo kiun oni povas fari el ĝi, estos ĝia adopto kiel normala alfabeto de la Popoloj nelegipovaj kaj nehavantaj ankoraŭ ian ajn alfabeton.

Rezolucio de la 7-a Nacia Kongreso de A.E.D.E.

23-26/11/1981 Montecatini

La subskribintoj delegitoj al la VIIa Nacia Kongreso de A.E.D.E. (Association Européenne des Enseignants) Itala Sekcio, post diskuto, modifo kaj aprobo de la rezolucio prezentita de AEDE-grupo de Massa, sub la titolo «Kiu lingvo por la unuiĝinta Eŭropo?»;

— ekzameninte la procedon de la politika integriĝo de Eŭropo kaj la neceson ke ĝi realiĝu kiel eble plej baldaŭ

Asertas

ke la rekta elektado de la Eŭropa Parlamento ne estas de si mem elemento rapidiganta la integriĝan procedon pro la ne sufiĉaj povoj rekonitaj al la Parlamento mem;

Evidentigas

la ne konfuteblan fakton ke je nivelo de la popolaj tavoloj, la nacia sento hodiaŭ identigas konkrete kun la lingvo parolata, kun la klara konsekvenco ke decida elemento por krei popolon kun konscio kaj sento eŭropaj, estas la adopto de unu kunliga lingvo kiu fariĝu la dua komuna lingvo de ĉiu popolo; ĝi uzata ankaŭ kiel laborlingvo, solvos la lingvan problemon ekzistantan je nivelo de la komunumaj institucioj;

Asertas

ke neniu nacia lingvo povas plenumi tian taskon. La elekto de unu nacia lingvo kiel oficiala lingvo por Eŭropo ne solvus la problemon kaj kreus daŭrajn diskriminaciojn en la socia, kultura kaj morala kampoj favore al grupo da popoloj kaj malfavore per ĉiuj aliaj entenate la nia;

Asertas plie

ke la elekto de lingvo neŭtrala kaj supernacia, kiun la proponintoj opinias esti la in-

ternacia lingvo Esperanto, estas probleme ne plie prokrastebla, se oni celas al realigo de Eŭropo kaj de socio vere federaciaj.
Sekve

Oni taskas

la Centran Komitaton organizi dum 1982 eŭropan kunvenon pri la temo: «Kiu lingvo por la Unuiĝinta Eŭropo?».

Milano — Tamarollo Giuseppe
Grosseto Roccastrada — Corenzetti Lidia
Pisa — Capitani Guidi Iris
Massa — Dazzini Catina
Livorno — Bastogi Giuliana
Roma — Pecoraro Giuseppe
Messina — Alessandro Zappalà
Genova — Ferdinando Durand
Messina — Domenico Parlavecchio
Città S. Angelo — Gabriele Centorame
Oria di Bari — Bruna Micelli
Verona — Perusi Longo Maria
Padova — Livia D'Ancona
Carrara — Mario Dazzini
Pietraligure — Adriana Beccino
Roma — Pompeo Angelo
Cremona — Luigi Bisicchia
Taranto — Quartararo Mariano
Calizzano (Savona) — Alba Briozzo
Cagliari — Maria Teresa Piano Olla

Neceso de Internacia kunlaboro interne de «Eŭropa Asocio de la Instruistoj»

Alberto Menabene, Italujo

Kun piezuro mi informas, ke dum la itala kongreso de «Eŭropa Asocio de la instruistoj «AEDE» (novembro 1981) estas akceptita rezolucio prezentita de AEDE-grupo de Massa, sekve de kiu la novelektita nacia estraro devos dum la jaro 1982 organizi internacian kunvenon por debati la eŭropan lingvan problemon kaj proponi solvon por ĝi.

Krome mi informas, ke mi estas nun komisiito por pretigi projekton de nova statuto de AEDE kiu, en la ĝisnuna teksto, ne parolas pri Esperanto. Kaj mi aldonis al la teksto, interalie, ĉapitron, kiu diras:

«Estas oficialaj lingvoj de AEDE ĉiuj lingvoj de la landaj sekcioj de la Asocio plus Esperanto». (Tiu ĉi estus la unua paŝo al la adopto de Esperanto kiel laborlingvo de AEDE kaj al la esperantigo de tiu Asocio).

Baldaŭ la itala centra Komitato diskutas la projekton de la nova statuto, kaj verŝajne aprobas ĝin; poste, oni devos ĝin prezenti al la eŭropa kongreso por ĝia internacia akcepto. Intertempe okazos la internacia kunveno dirita ĉe la komenco, kies konkludo sendube ankaŭ influos la eŭropan kongreson.

Nu, kelkaj bonaj rezultoj jam estas atingitaj en nia lando sed, kompreneble, ĉio atingita aŭ atingota en Italujo povos restadi komplete senefika laŭ internacia vidpunkto se ankaŭ eksterlande oni ne atingos analogajn rezultojn kaj se mankos kunordigo de la fortoj.

Tial mi varme invitas ĉiujn membrojn de ILEI, de la landoj kie ekzistas naciaj sekcioj de la Eŭropa Asocio de la Instruistoj, aliĝi urĝe al AEDE por levi en ĝia interno la lingvan problemon kaj proponi Esperanton kiel ĝian solvon.

Se oni komencos tuj la agadon ni povos certe influi la ĉi-jaran internacian kunvenon kaj, precipe, la eŭropan kongreson de AEDE en 1984, kie estos eble prezenti kaj akceptigi la proponon de la adopto de Esperanto kiel laborlingvo de AEDE.

Por atingi tion estas necese, ke multaj esperantistoj (en la respektivaj naciaj AEDE-kongresoj) estus elektitaj delegitoj al la eŭropa AEDE-kongreso.

Des pli bone, kompreneble, se ili krome sukcesos aprobigi, en la respektivaj landaj aŭ grupaj kongresoj, poresperantajn rezoluciojn, kiel okazis en Massa.

La tre simpla sistemo ekspluatita en Italujo estas la jena:

— la ILEI-instruistoj de la grupo de Massa (kie ne ekzistis AEDE-sekcio)* starigis ili mem la lokan sekcion de AEDE (en la respekto de la itala reglamento, laŭ kiu necesas dek instruistoj por krei ie novan grupon);

— okaze de la nacia kongreso, ili mem aprobis, en la loka asembleo, poresperantan rezolucion;

— ili, uzante la titolitan paperon de la AEDE-sekcio de Massa, diskonigis la tekston de la aprobita rezolucio al la aliaj lokaj grupoj de AEDE, por influi ilin;

— ili mem elektis delegiton (al la nacia kongreso) esperantista, kiu dum la kongreso invitas la asembleon de la delegitoj aprobu la Massa-rezolucion (kiu fakte estas aprobita, post akordiĝo pri kelkaj ŝanĝoj, fare de la plimulto).

Nu, je tiu ĉi punkto estas necese kunordigi la agadon internacie, kaj, por tion fari, ĉiu landa sekcio de ILEI (bone klariginte la situacion al la respektivaj membroj, kaj haviginte al si la landan reglamenton de AEDE) devus inviti la respektivajn ILEI-instruistojn:

a) peti individuan aliĝon al la loka AEDE-grupo, se tie ĝi ekzistas;

b) starigi ili mem la lokan AEDE-grupon, se ĝi tie ne ekzistas.

Notu bone, ke la kazo b) (situacio analoga al tiu de Massa) estas ege fruktodona.

Do, se laŭ la reglamento necesas (kiel en Italujo) dek instruistoj por starigi AEDE-grupon povas esti:

1) ke surloke estas disponebla la necesa nombro da instruistoj, kaj tiam la afero glitas facile;

2) ke surloke la disponeblaj ILEI-instruistoj estas, ekzemple, nur ok: tiam tiuj ok devas peni akordiĝi kun aliaj du instruistoj (ĉu eŭropemaj, ĉu simple amikaj) por atingi la necesan nombron.

Subskribinte peton pri starigo de grupo al AEDE-sekcio, laŭ reglamento, ili atendos la pozitivan respondon. Post ĝia alveno ili komencos la agadon, presigante titolitan paperon de la AEDE-grupo, elektante prezidanton esperantista, aprobante rezolucion pri la lingva problemoj kaj ĝia solvo Esperanto k.t.p.

Kiel organizi praktike la aferon?

Ĉar mi estas nun la konsilanto de Itala Esperanto-Federacio komisiito pri premoj ĉe parlamentanoj, kaj agado ĉe partioj kaj, provizore, ĉe eŭropismaj asocioj, mi mem povas provizore kunordigi ankaŭ la agadon de la diverslandaj ILEI-instruistoj ĉe la respektiva AEDE-sekcio.

Tial mi sugestas, ke ĉiu ILEI-sekcio nomumu komisiiton pri AEDE-agado, kaj sciigu al mi nomon kaj adreson. La landa komisiito, ĉiufoje kiam li (ŝi) havas interesan informon, skribos al mi kiel kunordiganto; de tempo al tempo mi dissendos letercirkuleron en kiu mi resumos la evoluon de la situacio por ĉiu komisiito.

Kaj, okaze de la venonta internacia kunveno de ILEI, estus bone plani kunsidon por ĉiuj AEDE-komisiitoj.

* Ne ĝusta informo ĉar en Massa, AEDE ekzistas jam de multaj jaroj kiel grupo kaj la sekcio de AEDE en Massa estas D-ro M. DAZZINI, kiu ne starigis ĝin.

Estraro de ILEI

Prezidanto: rektoro Helmut Sonnabend, Pappelweg' 22A, D-315 Peine, F R Germanujo.
Vicprezidanto: Anica Hurčak, Polić-Kamova 91/III, YU-51000, Rijeka, Jugoslavio.
Sekretario: d-ro prof. Mario Dazzini, Casella Postale 22, I-54100 Massa. Italujo.
Vicsekretario: prof. Francisko Zaragoza Ruiz, Collegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante, Hispanujo.
Financoj: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl 455, S-24200 Hörby, Svedujo.

Kunlaborantaj Organizoj

EEC Eŭropa Esperanto-Centro, Rue Montoyer 37, bte 24, B-1040 Brussel (Belgio).
Konstanta reprezentanto de ILEI ĉe E.E.C.:
S-ino Elfriede Ernst, 154 Bld. de Smet de Naeyer bte 7, B-1090 Brussel.
FIMEM Fédération Internationale de Mouvements d'Ecole Moderne, 42 Grande Rue, F-92310 Sevres.
SAT Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, F-75020 Paris.
UEA Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.
UNESKO Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de Unuiĝintaj Nacioj, 7 Place Fontenoj, F-75007 Paris.
Konstanta Reprezentanto de ILEI ĉe Unesko:
Prof. James Fairbank, 6 Avenue Théodore Rousseau, F- 75016 Paris (tf. 6479187).

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO — IPR

en rilatoj de reciproka informado kun Unesko, Kategorio C

Aperas trifoje jare

redaktas: Helmut Sonnabend, Pappelweg 22A, D-315 Peine,
FR Germanujo

membreco en I.L.E.I. inkluzivas la ricevon de IPR

abonprezo por nemembroj: 30 svedaj kronoj (inkluzivas afrankon kaj aerpoŝton)

Kontoj:

1. poŝtĝirkonto: Stockholmo 682-117-7 I.L.E.I.
Bantorget 3 S-22229 Lund, Svedujo.
2. poŝtĝirkonto: 3789 64 — I.L.E.I. 2814 —
UEA NL Rotterdam 3007 — Nieuwe Binnenweg 176.

manuskriptojn sendu duoble (skribmaŝine) al la redaktoro